

Enhavo

- **anoncoj**

Amikeco Translimen denove aktivas; Free downloads from the *retbutiko*; New titles in the *retbutiko*; Used titles from the book service; Korespondi deziras

- **leterkesto**

Kiel esperantistoj festas Tagon de la Gepatra Lingvo?

- **Kiel provizi kialojn por lerni Esperanton**

de la prezidanto - Orlando E. Raola

En la agado por disvastigi Esperanton kaj varbi novajn homojn por ĝia lingva komunumo, ofte aperas la demando: 'Kial mi lernu la lingvon?' Homoj lernas Esperanton pro plej diversaj kialoj, sed la plej grava kialo lerni la lingvon estas spirita pliriĉiĝo. Homoj kiuj dividas tiun ideon estas forte motivigitaj kaj neniam pridubas la agon lerni. Tamen, restas la ceteraj. Utilas al Esperanto-aktivulo havi klaran ideon pri eblaj motivoj, por laŭbezone disponigi al varbatoj depende de ties specifaj interesoj kaj karakterizoj.

- **Skrablo: vortludo populara, tamen iom ĥaosa**

ludoj - Hoss Firooznia

— "Hm... Do, bone. Antaŭ tiun vorton mi almetas tegoletojn A, R, B, A, kaj R, kaj poste, U kaj J. Hura! Sepdek poentojn!"
— "Ve... kia monstraĵo. ARBARMANĜILARUJ? Ne, tio neniel povas esti valida." — "Ĝi estas *tute* valida. Klare, ĝi estas ujo por aro de iloj, kiujn oni uzas por manĝi arbarojn. Memkompreneble!"

- **Kion bestoj diras en Esperanto?**

demandu al Usona Esperantisto - Lee Miller

Preskaŭ ĉiu scias ke en Esperanto, kato *miaŭas* kaj hundo *bojas*. Sed ĉu vi scias ke krokodilo *lamentas* kaj muso *cincas*? Kiajn blekojn (kaj alispecajn sonojn) faras aliaj bestoj en Esperanto? Ĉi tie, instruisto Lee MILLER prezentas liston kompilitan el pluraj fontoj.

- **Pli pri la nomo Usono**

historie - Lee Miller

En n-ro 2013:6 Lee MILLER respondis demandojn pri deveno de la nomo *Usono*. Nia diligenta leganto Bob RUSSELL pluesploris la historion kaj trovis kelkajn interesajn citaĵojn, helpe de la anglalingva *Wiktionary*.

- **"amiko"**

senintenca esperantaĵo? - Kinen Carvala

"Amiko de amiko estas ankaŭ amiko", skribis Zamenhof. Kaj nun, ĝi estas ankaŭ butiko.

- **"triloka"**

senintenca esperantaĵo? - Breto Sanders

Dankon al Breto SANDERS pro la foto. Li skribis: "Mi supozas ke la kreintoj intencis diri, ke tiu ĉi parfumo plej efikas, kiam oni ĝin aplikas je tri lokoj sur la korpo..."

ISSN: 1056-0297

Usona
Esperantisto
Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2014:2 (mar-apr)

American Esperantist
Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2014:2 (mar-apr)

Ĉi-numere:

- De la prezidanto: Kiel plej efike informi pri Esperanto?
- Demandu: Kion diras bestoj en Esperanto?
- Kaj pli...

Ĉi-numere en nia rubriko ludoj ĉefrolas la fama tabulludo Skrablo

Amikeco Translimen denove aktivas

Entuziasmigite de la sukceso pasintjara, kiam ni venigis amikon Rikardo Salazar el Kubo por partopreno en NASK kaj nia nacia kongreso, ni iniciatas denove *Amikeco Translimen* por la jaro 2014. Viaj malavaraj donacoj ĉi-foje helpas la veturigon al Viktorio, BC, Kanado de juna irana esperantisto. Li estas studento pri komputila lingvistiko en Teherano, mem lernis Esperanton kaj poste fariĝis aktivulo en la landa movado. Antaŭnelonge li partoprenis la Unuan Kongreson de Esperanto en Irano. Sed ĝis nun li ne havis internaciajn spertojn pere de Esperanto. Li tutcerte profitos el partopreno en la somera kursaro, la AMO-seminario kaj la kunaj landaj kongresoj de usonaj kaj kanadaj esperantistoj.



Bonvolu sendi vian kontribuon kiel eble plej rapide la Centra Oficejo de Esperanto-USA kun indiko: AMIKECO TRANSLIMEN.

Dankon!

— O. RAOLA
Prezidanto, Esperanto-USA
Iniciatinto de la fonduso Amikeco Translimen

Free downloads from the *retbutiko*

Several newly available downloads are now available free to members (100% discount) at our online bookstore [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>]:



- **HISTORY OF E.L.N.A.**
William R. Harmon. Covers the period from 1952 to 2002. Includes lists of national and regional congresses, important individuals, Esperanto books published in the U.S. Many black-and-white photographs. 2002. **\$2.00**
- **SINJORO ĈIOSCIULO**
W. Somerset MAUGHAM, elangligis F. R.

BANHAM. La angla titolo estas *Mr. Know-All*.
\$2.00

- **VIVO KAJ MORTO DE WIEDERBORN**
Clelia Conterno GUGLIELMINETTI. Amuza rakonto de fama verkistino. Rimarku: tiu ĉi ne estas la antologio de Korĵenkov, kiu havas la saman titolon. Kunpremita en la dosiero estas versioj en PDF, EPUB, kaj MOBI. **\$2.00**

New titles in the *retbutiko*

- **BELARTA RIKOLTO 2013**
Premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio. Mola bindaĵo. 91 paĝoj. 2013. Usono. **\$14.77**
- **INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO 2013**
Mola bindaĵo. 136 paĝoj. 2013. Nederlando. **\$24.68**
- **SIGNOJ DE VIV' i.d.c.** La grupo *inicialoj de* estas plurlingva popa projekto, starigita en 2003 en Frankfurto ĉe Majno, Germanujo. CD. 2012. **\$24.06**



Order from *Esperanto-USA*, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, or online [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>].

Used titles from the book service

Newly available used books from our bookstore [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>]. Members receive a 25% discount on all used items.

- **LETEROJ DE L. L. ZAMENHOF**
De L. L. ZAMENHOF, tradukis G. WARINGHIEN. Ne tre bona stato. Malmola bindaĵo. 372 paĝoj. 1948. \$11.94

- **LINGVO KAJ MENSŬO**
De Noam CHOMSKY, tradukis Edmund GRIMLEY-EVANS. Bona stato. Mola bindaĵo. 188 paĝoj. 2010. Kolekto de eseoj pri lingvosciencaj kontribuoj al studado de la mensŭo, formo kaj signifo en naturaj lingvoj, naturo de la lingvo, lingvoscienco kaj filozofio, biolingvistiko. \$10.74
- **LUNO DE IZRAEL**
De H. Rider HAGGARD. Tradukis Edward S. PAYSON kaj Montagu C. BUTLER. Ne tre bona stato. Mola bindaĵo. 219 paĝoj. 1928. Rakontas la Biblia Eliro el Egiptujo. \$10.74
- **MAKSIMOJ**
De LA ROCHEFOUCALD. Tradukis G. WARINGHIEN. Bona stato. Mola bindaĵo. 112 paĝoj. 1986. 500 maksimumoj el la franca kaj Esperanto. \$4.00
- **MIRINDA SORĈISTO DE OZ, LA**
De L. Frank BAUM, tradukis H. R. DREYER. Bona stato. Mola bindaĵo. 145 paĝoj. 2000. \$12.62
- **MONDA FEDERACIO?**
De Ronald J. GLOSSOP, tradukis Johano RAPLEY. Bona stato. Malmola bindaĵo. 356 paĝoj. 2001. Esploro de la bazaj ideoj de demokracio, registaro, federacio, kaj internacia leĝaro, kaj ampleksa analizo de federacia mondregistaro. \$16.94
- **A COMPLETE GRAMMAR OF ESPERANTO**
By Ivy Kellerman Reed. Good condition. Hardcover. 333 pages. 1931. \$8.56
- **KRISTNASKA SONORADO**
De Charles DICKENS, tradukis Martyn WESTCOTT. Malbona stato. Malmola bindaĵo. 83 paĝoj. 1905. Fama rakonto pri s-ro Scrooge kaj la tri fantomoj de Kristnasko. \$21.50
- **EDINBURGH ESPERANTO POCKET DICTIONARY**
Fair condition. Hardcover. 288 pages. 1956. Two-way dictionary. \$4.65
- **ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY**
By Joseph Rhodes. Good condition. Hardcover. 547 pages. 1908. Early dictionary of the Esperanto movement. \$8.18
- **ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY**
By Fleming Fulcher and Bernard Long. Good condition. Hardcover. 332 pages. 1963. One-way dictionary. \$15.00
- **ESPERANTO: THE STUDENT'S COMPLETE TEXTBOOK**
By J. C. O'Connor. Poor condition. Hardcover. 175 pages. 1903. \$2.00
- **ESPERANTA ANTOLOGIO**
Redaktita de William AULD. Bona stato. Malmola bindaĵo. 640 paĝoj. 1958. Superrigardo de Esperanta poezio de 1887 ĝis 1957. (Ne konfuzu ĝin kun la dua eldono, kiu aperis en 1984.) \$12.45
- **ESPLORADO DE VIVĜOJO**
De Hidemaru DEGUĈI. Bona stato. Mola bindaĵo. 203 paĝoj. 1986. Observoj, pensoj, kaj konsiloj pri la vivo, kompilitaj el kajeroj de la aŭtoro kiam li estis juna. \$15.00
- **ETA VIVO**
De Clelia Conterno GUGLIELMINETTI. Ne tre bona stato. Mola bindaĵo. 133 paĝoj. Poemaro de fama verkisto. \$4.30
- **FUNDAMENTA INSTRUO DE ŬONBULISMO**
Bona stato. Malmola bindaĵo. 164 paĝoj. 1998. Ŭonbulismo estas religio fondita de Sotesano (1891-1943), en 1916, Koreujo. Ĝi prenas, kiel kredobjekton kaj praktikmodelon, cirklon, kiu estas la darmkorpa budho. Sotesano esprimis per cirklo la fundamentan veron de la universo, pri kiu li ilumiĝis meminstruite post dudekjara asketa penado. \$12.48
- **TRI VERKOJ DE VOLTER**
Tradukis E. LANTI. Ne tre bona stato. Malmola bindaĵo. 312 paĝoj. 1956. Enhavas: *Kandid aŭ*

la optimismo, Zadig aŭ la destino, kaj Senartifikulo. \$15.00

Order from *Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530*, or online [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>].

Korespondi deziras

Mi multe ĝojas iĝi via amiko el Rutshuru, Demokratia Respubliko Kongo (DRK). Mi multe interesiĝas pri Esperanto kaj cetere mi jam finkomponis ok kantojn por – kaj en – Esperanto, en la grupo *Afrika Stelo*. Plaĉas al mi naturo, legado, vojaĝo kaj religio. Kara usonaj amikoj, mi atendas legi de vi. **Joel MUHIRE**, <espmuhire@gmail.com>

Mi naskiĝis en 1985 kaj diplomiĝis el universitato en 2007 kaj samjare mi komencis lerni Esperanton. Mi lernadis en Anglujo ekde 2009 ĝis 2013. Mi estas magistro, MBA. Nun mi laboras en vendejo en Ŝanhao kaj en postlabora tempo mi instruas la anglan lingvon al tiuj kiuj iros eksterlanden. Mi loĝas en la distrikto Huangpu, centre de la urbo. Mi ŝatas turismon. Decembre de la pasinta jaro mi vojaĝis en la urbo San-Francisko de Usono. Mi volus korespondi kun fraŭlino(j) el Usono kiu(j) naskiĝis post 1988. **Nicolas CHEN** <Nicolas.d.chen@gmail.com>



senintenca esperantaĵo?

“amiko”

Kinen CARVALA



“Amiko de amiko estas ankaŭ amiko“, skribis Zamenhof. Kaj nun, ĝi estas ankaŭ butiko. Dankon al nia leganto Kinen CARVALA, kiu fotis la jenan ŝildon dum promeno tra japan-kvartala bazaro en norda Kalifornio.

leterkesto

Kiel esperantistoj festas Tagon de la Gepatra Lingvo?

Mi denove embarasiĝis ĉar mi denove forgesis la okazon de la Tago de la Gepatra Lingvo. En Usono, lando de nenombreblaj lingvoj, mi certe povas trovi taŭgan manieron per kiu festeti la tagon, kvankam ne estas proksima al mi Esperanto-klubo.

En multaj landoj, inter ili Usono, ekzistas la kutimo ornamu publike videblajn fenestrojn. Feliĉe, mia apartamento havas grandan fenestron kiu estas videbla de la korto de la konstruaĵo. Sed kiel mi venontjare ornamu tiun fenestron? Se mi videbligis klarigan afiŝeton kaj aldonos paperajn fluliniojn kaj specimenajn literojn de kelkaj alfabetoj, eble tio estos bona komenco.

Ĉu iu leganto havas aliajn ideojn pri manieroj per kiuj festeti la okazon?

— Erik FELKER, <ejfelker@dslextrême.com>

[Por tiuj, kiuj ne scias pri la Internacia Tago de la

Gepatra Lingvo [http://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Tago_de_la_denaska_lingvo], ĝi estas iniciato de UNESCO, unue anoncita en 1999. Ĉiujare oni festas la 21-an de Februaro por subteni multlingvecon kiel gravan kulture heredaĵon. Pri la ĉi-jara festo, Ĝenerala Sekretario BAN Ki-Moon skribis [<http://goo.gl/BRDBya>]: “Ni ĉiuj kunlaboru por subteni lingvan diversecon kaj multlingvecon kiel ĉefelementon en niaj klopodoj konstrui pli bonan mondon kaj dignan vivon por ĉiuj.” — Red.]

Skribu al Usona Esperantisto!

Bonvenaj estas viaj komentoj (en la angla aŭ en Esperanto) ĉu pri Esperantujo, ĉu pri la lingvoproblemo, aŭ ĉu pri io lastatempe aperinta en *UE*. Leteroj estu prefere ne pli ol 300 vortojn longaj; anoncoj, ne pli ol 400. Sendu mesaĝojn al la redakcio.



Kiel provizi kialojn por lerni Esperanton

Orlando E. RAOLA

Jen teksto el prezento kiun Orlando faris en Horany, bela insulo 40 km norde de Budapeŝto, kie kune okazis kaj la Junulara Esperanto Renkontiĝo de la hungara esperantista junularo kaj la unua Seminario por Aktivula Maturiĝo.

Demandite de intereso aŭ eklernanto “Kial mi lernu la lingvon?” la instruisto/varbanto ne hezitu provizi kialojn. Temas ĝenerale pri decida punkto, ĉar se la kialoj estas ja konvinkaj, post ioma cerbumado, la ricevinto daŭros kun certeco pri la celo, kaj se la argumentoj estas lamaj kaj malfortaj, la ricevinto povas facile elreviĝi, forlasi la lernadon aŭ eĉ pli damaĝe, fariĝi kontraŭulo aŭ kontraŭpropagandisto de la Esperanta afero. Dum la lastaj du jardekoj, mi agadis diverslande por Esperanto kaj ree kaj ree devis respondi tiun demandon. Jen kelkaj ideoj ĉerpitaj el mia persona sperto. Mi celas nur sproni cerbumadon pri similspecaj klarigoj fare de la partoprenantoj, kaj tiel kontribui al aktivula maturiĝo. Jen miaj respondoj:

“Por aniĝi al unuspeca internacia lingva komunumo.”

Per akirado de la lingvo, lerninto aniĝas al tutmonde disvastiĝinta lingva komunumo kapabla interkompreniĝi samlingve. Krome, la kompetenteco komunikiĝi en tiu lingvo ne dependas de la nekontrolebla fakto kie oni naskiĝis kaj kiun lingvojn oni lernis denaske, sed de koscia alstrebo kaj sindediĉo al mastrado de la nova komunikilo. Tio estas unikaĵo de la Esperanto-komunumo kaj funda kompreno de tiu fakto povas efiki kiel sufiĉe forta motivo por multaj personoj.

La uzo de Esperanto sendube pliigas egalecon kaj demokratecon en internaciaj rilatoj. Kiam internacia komunikado okazas inter malsamlingvuloj, uzante la denaskan lingvon de unu el la komunikantoj, du gravaj ĝenaj faktoroj enmiksiĝas: unue, temas pri la altrudo, la evidenta avantaĝo kaj supereco de tiu kiu uzas sian denaskan

lingvon. Due estas la oreŝira buĉado de ies lingvo fare de persono kiu balbute emas komunikiĝi uzante ĝin. Kiam okazas komunikado en Esperanto, la partoprenanto alvenas al glata lingva ebenaĵo, kie neniu havas apartan avantaĝon.

Fine, por politike/ideologie/filozofie motivigitaj homoj, Esperanto plenumas revon de egalrajteco en lingva komunikado, de plej vasta racieco en la uzo de lingvaj rimedoj. Pro ĝia naturo, estiĝo kaj historio ĝi estas en enviinda pozicio por fariĝi la lingvo de tiuj kiuj emas al naturmedia protektado, al rezistado kontraŭ la senkompata ekspluatado de la mondo fare de transnaciaj korporacioj, al certigo de daŭripova evoluo por la homa socio sur la planedo.

“Por vojaĝi al Esperantolando. (Sed bonvolu ne serĉi ĉe Google-mapoj.)”

La sperto de transnaciaj interpersonaj kontaktoj en Esperanto, specife dum internacia vojaĝado, povas konvinki tiujn, kiuj spertis la supraĵecon kaj mankojn de vojaĝado al loko kie oni ne komprenas la lokan lingvon aŭ kiam oni uzas lingvon fremdan jen por unu el la partoprenantoj en la komunikado, jen por ambaŭ. La Esperanto-komunumo provizas rimedojn kaj eblecojn tute ne haveblajn ekster ĝi kaj esence malsimilajn al la eblecoj haveblaj al personoj kiuj ne scipovas la lokan lingvon de la vizitataj lokoj.

“Por ĝui tradukitajn literaturajn verkojn.”

Legemaj/literaturemaj personoj ofte alvenas al punkto, kiam ili deziras ĝui literaturajn produktojn de fremdaj kulturoj, kiujn ili ne kapablas legi en la originala lingvo. Kompreneble ekzistas bonaj tradukoj de gravaj verkoj en multaj etnaj lingvoj, sed kiel eviti sperti la strangecon imagi homojn de iu difinita etna deveno utiligantajn esprimilon profunde ligitan al alia etna grupo? Tio ĉi validas ne nur por literaturo, sed por ĉiuj artaj esprimoj kiuj utiligas parolan komunikadon (kinoarto, teatro, ktp.) . Estas bona ŝanco ke la tradukoj disponeblaj en Esperanto estas plej altkvalitaj kaj la lingva kaj kultura neŭtraleco de la perilo ofte ebligas pli facilan

transmetadon de la literatura valoro de la verkoj.

“Por sukcesi en lernado de fremda lingvo.”

Multaj homoj spertis fortan frustriĝon kaj eĉ “komplekso de malplivaloro” ĉar dediĉinte multajn jarojn al lernado de fremda lingvo, ili apenaŭ sukcesas balbute demandi la direkton al la necesejo kaj povas eĉ suferi akcidenton ĉar ili ne akurate aŭ rapide komprenos la respondon de la demandinto.

Ĉar Esperanto estis elpensita kaj kunmetita kun la difinita celo plifaciligi la homan komunikadon, ĝi estas ja pli facile lernebla kaj mastrebla ol multaj naciaj lingvoj.

Tamen, la argumento pri la facileco de la lingvo estas iom dorna tereno, kaj la aktivuloj kaj informdonantoj devas esti aparte zorgemaj por eviti troigojn, evidentajn blagojn kaj eĉ de tempo al tempo skandalan mensogadon. Jes, ja, Esperanto estas pli facila ol plejmulto de la naciaj lingvoj rilate multajn individuajn detalojn, sed ĉar ĝi estas esprimsistemo kompleta en si mem, ĝi ne povas eviti certan gradon de komplekseco, komunajo de ĉiuj homaj lingvoj. Pro tio, lerni kaj plej grave ellerni ĝin postulas konscian strebon kaj laboron kaj tute ne estas rezulto de mirakla facileco aŭ lingva osmozo. Historie, la streboj al disvastigo/pliutiligo estis ĝenita de tiuj kiuj sin ĵetis al la disvastiga (kaj eĉ pli danĝere) al la instrua laboro antaŭ ol ili mem ellernis la “facilan lingvon”. La malbonaj efikoj de tiu situacio estas multflankaj: ridindigo de la tuta strebo, pridubigo de la grava punkto de lingva facileco, aŭ (eĉ pli danĝere) transdoni ideon pri la limigiteco de la propraj lernokapabloj, kiun la aŭskultantoj povas konsideri ĝeneralan trajton de la tuta lingva komunumo.

Alia diskutinda punkto en tiu ĉi malnova argumento estas la rezultoj de esploroj kiuj sugestas, ke la relativa facileco de la lingvoj lernataj kiel dua lingvo dependas de la proksimeco inter tiu lingvo kaj la denaska lingvo de la lernanto. Surbaze de tiu ideo, ekzemple, la daŭro de la lingva trejnado de personoj kiuj laboras por la usona registaro eksterlande estas disdividita jene: 24 semajnoj: (germana, itala, franca, hispana kaj portugala); 36 semajnoj (svahila, indonezia, malaja); 44 semajnoj (hinda, urdua, rusa, hungara) 88 semajnoj (araba, ĉina, japana kaj korea). Tiu ĉi disdivido funkcias ankaŭ inverse:

parolantoj de la araba kaj la ĉina raportas havi pli da malfacilaĵoj akiri fluecon en la angla ol parolantoj de la hispana. (Terence ODLIN, *Language Transfer*, 1989).

Estus interese science esplori kiun lokon Esperanto okupus en tiu grupiĝo. Ĉu oni bezonas krei apartan kategorion, ekzemple, asertante ke oni povas akiri fluecon en Esperanto post 12-16 semajnoj da intensa lernado? Ĉu estos bezono mezuri la daŭron ĝis flueco depende de la denaska lingvo de la lernantoj? Ĉu samaj tendencoj trovitaj rilate la lernadon de la angla estos troveblaj rilate la lernadon de Esperanto?

“Por doni alternativan vojon al tiuj kiuj ne volas vivi en mondo unulingva (legu anglalingva).”

La juna Interret-civitano, fornaŭzita de la fakto, ke proksimume 80 elcentojn de la enhavo de Interreto estas en la angla (Barbara WALLRAFF, *The Atlantic Monthly*, 2000 [<http://bit.ly/1jA6uRq>]) povas trovi allogon kaj repaciĝon en la ideo lerni Esperanton por solvi siajn personajn komunikproblemojn. Kreskas la volo de multaj homoj ĉiam havi pli kaj pli da enhavo en la propra lingvo aŭ eĉ simple en “alia lingvo” ol la monopolisma angla. Kaj estas tiom da lingvoj en la mondo kaj la emo fariĝi flua uzanto de eĉ malgranda nombro el ili estas preter la kapabloj de la plimulto de la homoj, kaj eĉ pli, foruzas multege da tempo. Esperanto efikas antidote por tiuj kiuj malesperas kaj klopodas eskapi tiun ĉi situacion per cirkla kurado.

Konklude: Oni trovos tiom da kialoj kiom da homoj serĉantaj kialojn. Ni emu liveri al ĉiuj la ĝustan kialon. Ankaŭ ni devas konsideri la elmontradon de Esperanta praktiko kiel nerektan varbilon. La observantoj devas decidi per si mem ĉu indas okupiĝi pri la lingvo aŭ ne. La montrantoj eble ne bezonas doni argumentojn ĉu favorajn ĉu malfavorajn, ili nur devos montri la realan uzon de la lingvo por diversspecaj praktikaj celoj kaj sugesti la pli bonan mondon kiu povus estiĝi kiel konsekvenco de ĝia disvastigo.

Skrablo: vortludo populara, tamen iom ĥaosa

Hoss FIROOZNA

“Jam estas via vico. Metu viajn tegoletojn.”

“Hm... Do, bone. Antaŭ tiun vorton mi almetas tegoletojn A, R, B, A, kaj R, kaj poste, U kaj J.
Ha! Mi gajnas sepdek poentojn!”

“Ve... kia monstraĵo. ARBARMANĜILARUJ? Ne, tio neniel povas esti valida.”

“Ĝi estas *tute* valida. Klare, ĝi estas ujo por aro de iloj, kiujn oni uzas por manĝi arbarojn. Ha *ha!* Memkompreneble.”

“Ridinde. En normala parolo neniu uzus tian stultaĵon.”

“Nu, *mi* uzus! Jen: ‘La giganta reptilio *Godzilla* konservas sian salatforkon en arbarmanĝilarujo.’
Ha ha *ha!* Sepdek poentojn!”

“Ho, ve...”

El ĉiuj vortludoj en la mondo, la plej fama devas esti *Scrabble*, tiu bone konata tabulludo en kiu oni kreas krucvortojn per hazarde elektitaj tegoletoj. Unue elpensita de arĥitekto Alfred Mosher BUTTS en 1938, la ludo ankoraŭ furoras eĉ nun, post 75 jaroj. Ĉiujare vendiĝas pli ol miliono da ekzempleroj en nur Usono sole.

Kvankam originale la ludo estis nur anglalingva, post kelkaj jardekoj aperis adaptaĵoj en pluraj aliaj lingvoj. Ne estas tute klare, kiam oni unue adaptis la ludon al Esperanto, sed en la jaro 1997 germano Wolfram DIESTEL eldonis sian regularon por esperantlingva *Skrablo* en la Tut-Tera Teksaĵo. En postaj jaroj oni evoluigis liajn regulojn, kaj hodiaŭ, ankaŭ la plej aktuala regularo havas sian propran retpaĝon [<http://skrablo.ikso.net/regularo.php>].

Pro la vasta populareco de *Scrabble*, estus verŝajne iom balaste klarigi ĝian regularon ĉi tie. Anstataŭe, ni rimarku kelkajn el la unikaj defioj kaj ebloj, kiujn

prezentas la ludo en sia Esperanta vestaĵo.

Havebleco

Bedaŭrinde, ne eblas aĉeti oficialan ekzempleron de *Skrablo*. La marko de la anglalingva originalo estas prokitektita per kopirajto, kaj eldonanto supozeble devus pagi grandan tantiemon por ricevi tiun rajton. Ĉu ekzistas en Esperantujo sufiĉe granda merkato por pravigi la elspezon?

La manko de oficialaj ludiloj tamen ne malhelpas maniajn skrablemulojn. Estas sufiĉe facile ludi en Esperanto sur nacilingva tabulo; la pli granda defio estas trovi konvenajn tegoletojn. Kompreneble, sur la dorsajn flankojn de nacilingvaj tegoletoj oni povas skribi Esperanto-literojn per feltskribilo... sed la rezulto estas iom krudaspekta.

Ĉe Esperanto-kunvenoj mi foje renkontas homojn kiuj diligente ĉizis aŭ eĉ brulmarkis siajn tegoletojn. Kvankam impona, tio estas vere temporaba laboro. Ludantoj ne tiel diligentaj – aŭ eble ne sufiĉe maniaj – eble preferus pli facilan solvon. Fine de la artikolo mi prezentos mian provon krei glumarkojn, kiujn oni povas elŝuti kaj presi per komputilo.

Kompreneble, en epoko de Interreto oni ankaŭ povas ludi tute sen materiaj tabulo aŭ tegoletoj. Kanadano Clayton “Argilo” SMITH kreis senpagan ludejon [<http://skrablo.ikso.net>] kie oni povas konkursi kontraŭ aliaj ludantoj ĉirkaŭ la mondo – aŭ eĉ kontraŭ komputila kontraŭulo!


Literofteco

Scrabble uzas cent tegoletojn entute. Du estas senmarkaj; ili povas anstataŭi ajnan literon. La aliaj 98 prezentas literojn laŭ ties oftecoj en la angla lingvo. Laŭdire, oni kalkulis tiujn oftecojn analizante artikolojn el la ĵurnalo *New York Times*.

La reguloj de esperantlingva *Skrablo* ne klarigas, kiel oni elektis la distribuon de ĝiaj tegoletoj; ĉu ili spegulas efektivan uzon de Esperanto? Mi kontrolis

tion uzante ciferigitan version de la *Fundamenta Krestomatio* el la retarĥivo *Project Gutenberg* [<http://gutenberg.org/ebooks/8224>]. Per komputilo, eblas kalkuli kiom ofte ĉiu litero aperas en la teksto – kaj sekve, kiom ofte ĉiu litero devus aperi en aro de nur 98 tegoletoj. Ekzemple, se litero havas oftecon de 9.3% en la *Krestomatio*, ni donu al ĝi $0.093 \times 98 =$ naŭ tegoletojn. Necesis foje rondigi rezultajn kvantojn – aparte por la plej maloftaj literoj – por atingi sumon de precize 98 tegoletoj.

Jen la rezulto, kompare kun la efektiva distribuo de tegoletoj en Skrablo:



Komparo de la relativa ofteco de literoj en Skrablo kaj *Fundamenta Krestomatio*.

Ŝajnas ke la distribuo de tegoletoj pli-malpli spegulas la efektivan lingvouzon. Tiel ĝi konvenas por ludo laŭ la anglalingva stilo, kiu permesas derivitajn vortojn; akcepteblaj en *Scrabble* estas ne nur la vorto *EAT*, ekzemple, sed ankaŭ la derivaĵoj *EATEN*, *EATING*, *EATER*, ktp. Ĉu tia ludstilo konvenas por esperantlingva Skrablo?

Vortfarado

Laŭ la reguloj, ludanto de Skrablo rajtas uzi ne nur radikojn, sed ankaŭ kunmetitajn vortojn laŭ la anglalingva stilo. Eblas aldoni afiksojn, vortfinaĵojn, kaj eĉ akuzativon. Do akcepteblaj estas ne nur *MANĜ*, ekzemple, sed ankaŭ *MANĜU*, *MANĜILO*, *MANĜILARO*, *MANĜILAREGUJO*, *EKSMANĜAJAĈON*, ktp, ktp...

Kiel rapide evidentiĝas, Skrablo estas multe pli ĥaosa ludo ol ĝia anglalingva kuzo. Preskaŭ ĉiam eblas aldoni ankoraŭ alian afikson, finaĵon, aŭ radikon por fari novan vorton el malnovan. Rezulte, ludantoj emas krei monstrajn vortojn, kaj la ludo iusence perdas sian defion.

Variaĵoj

Inter la diversaj ludstiloj eblaj, ni rimarku kelkajn:

Amuza(?) ĥaoso

Foje, la neeviteble monstraj vortoj povas esti utilaj – ekzemple en ludo por komencantoj kiuj konas nur malmultajn radikojn. Por ili, la fekunda vortfarado de Esperanto povas faciligi la ludon kaj instigi kreemon. Por eviti tutajn sensencaĵojn, ludgvidanto eble volus postuli ke vorto validas nur se ludanto kapablas uzi ĝin en sencohava frazo. La rezultaj disputoj povas esti tre amuzaj.



Mmm... salato! Sed ve, kie mi lasis mian arbarmanĝilarujon?! Raaaaŭr!

Vortara metodo

Por pli tradicia ludo, oni povas akcepti nur vortojn troveblajn en PIV [<http://vortaro.net>] aŭ ReVo [<http://reta-vortaro.de>], ekzemple. Similan regulon havas ankaŭ anglalingva *Scrabble*; eĉ ekzistas oficialaj vortaroj por *Scrabble*-konkursoj.

Esperanto estas tre tolerema pri kunmetaĵoj, kaj ne malofte oni uzas vorton tute kompreneblan laŭ siaj eroj, tamen ne troveblan en vortaro. Rezulte, ludanto ne ĉiam povas facile diveni, ĉu kunmetita vorto estos akceptebla aŭ ne.

Sen kunmetaĵoj

Simpla solvo estas simple malpermesi kunmetitajn vortojn entute. Anstataŭe, oni akceptu nur radikojn (ekz. *MANĜ*, *KAP*), afiksojn (*AD*, *ONT*), kaj la “memstarajn” vortojn kiuj ne bezonas finaĵon (*PER*, *ANKAŬ*).

Tia ludo povas esti iom pli defia, sed ĝi forigas la

problemon de disputoj pri dubindaj sencoj, kaj ankaŭ – almenaŭ parte – la dubon, ĉu vorto estos trovebla en vortaro aŭ ne.

Rimedoĵ kaj ligiloj

Ĉe la retejo de *Usona Esperantisto* vi trovos ligilon al virtuala *Skrablejo*, kaj ankaŭ elŝuteblajn glumarkojn, per kiuj eblas facile esperantigi nacilingvan *Scrabble*-tabulon kaj tegoletojn.



Hoss FIROOZLIA

Hoss estas komputilisto ĉe la Universitato de Roĉestro en okcidenta Novjorkio, kie li foje instruas Esperanton kaj studas tradukarton.

<hoss@lodestone.org>

Kion bestoj diras en Esperanto?

Lee MILLER



Mi ekinteresiĝis pri kiel nomi bestosonojn en Esperanto lastatempe, kaj post esplorado malkovris ke mankas multe da informo rilate la temon. En iu reta diskuto, Edmund GRIMLEY-EVANS el Britujo menciis ke la vortaro franca-Esperanto de Léger kaj Albault (1960)

enhavas liston de bestokrioj. Mi trovis tiun liston rete – la vortaro ne plu haveblas, krom ĉe kelkaj brokantejoj.

Mi trairis la liston kaj forigis kelkajn bestojn kiuj estas sufiĉe nekonataj, ordigis la liston alfabete laŭ la Esperantaj nomoj de bestoj, kaj aranĝis ĝin tabelforme. Krom tio, mi aldonis el la *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (PMEG; Wennergren, 2013) la sonojn de kelkaj bestoj en la listo. Efektive estas du apartaj demandoj: kiel oni priskribas aŭ nomas la sonon aŭ krion de besto, kaj kion diras la besto kiam ĝi krias.

Sube estas mia tabelo por viaj informo kaj reago. Ĉu vi konscias pri aliaj fontoj de tiaj sonoj/krioj? Se jes, estus bone pligrandigi la liston.

Ĉu vi havas demandon pri lingvo, gramatiko, kulturo, literaturo, historio, aŭ iu ajn rilate Esperanton? Sendu ĝin al la redakcio, kaj eble ni respondos ĝin en estonta numero de *Usona Esperantisto*.

laŭ <i>Dictionnaire Français-Espéranto</i> , 1961		laŭ <i>PMEG</i> , 2013
abelo	zumas	
aglo	kriĉas	
akcipitro	kriĉas	
alaŭdo	trilas	
anaso	kvakas, nazosonas	“gik gak”
anserino	kriaĉas, siblas, gakas	
ansero	ĵargonblekas	
apro	grumblas, nazosonas	
azeno	iaas	
besto	blekas	
birdo		“kvivit”
bovo	muĝas	

bubalo	blovas, muĝas	
bufo	flutas	“kŭaks, brekekekeks”
cervido	stertorblekas	
cervo	muĝas	
ĉevalo	henas	
cigno	siblas, trumpetas	
cikado	ĉirpas	
cikonio	klakas	
elefanto	trumpas	
falko	kriĉas	
fazano	kriaĉas	
garolo	kajolblekas	
grilo	ĉirpas, grincas	
gruo	trumpetas, kriĉas, krakas	
hieno	hurlas	
hirundo	babilas, pepas	
hundo	bojas, jelpas, graŭlas, hurlas, hojlas	“ŭa”
kamelo	blateras	
kapro	mekas	
kato	miaŭas, ronronas	
kokido	pepas	
kokino	klukas, gakras	“kluk kluk”
koko	kantas, kokerikas	
kolombo	rukulas	
korvo	grakas	
krokodilo	lamentas	
kukolo	kukuas	
leono	roras	
leporo	ĝemetas	
lupo	hurlas	
meleagro	gluglas	“glu glu glu”
merlo	fajfas	
mevo	knaras	

muso	cincas	
muŝo	zumas	
najtingalo	kantas, trilas	
noktuo	ululas	
papago	parolas	
pasero	pepas, kvivitas	
pavo	kriaĉas	
perdriko	kakabas	
pigo	kriĉas	
porko	gruntas	
rano	kvakas	“kva, kvak”
rinocero	trumpas	
ŝafo	beas	“be”
ŝakalo	jelpas	
serpento	siblas	“sss”
strigo	ululas	“hu hu”
taŭro	muĝas	
turto	kveras, rukulas	
urso	grumblas	
virŝafo	blateras	
vulpo	jelpas	

Pli pri la nomo *Usono*

Lee MILLER

En n-ro 2013:6 Lee MILLER respondis demandon pri deveno de la nomo *Usono*. Nia diligenta leganto Bob RUSSELL pluesploris la historion kaj trovis kelkajn interesajn citaĵojn, helpe de la anglalingva *Wiktionary* [<http://en.wiktionary.org/wiki/Usono>].

1898, *The Flaming Sword*, vol. 13 n-ro. 33, pĝ. 9:

A St. Louis professor endeavors to invent a new name for the United States, a cabalistic affair, USONA, composed of the initial letters of the words United States of North America; the people he would designate as Usonian.

1899, “German letter (Chemnitz, July 15, 1899)”, *American Wool and Cotton Reporter*, vol. 13, pĝ. 924 [24]:

Usona (U. S. of A.), a land that looked like a lost land to us two years ago, was our biggest buyer, says a local expert.

1905, “The New U.S. Pharmacopœia”, *The Pharmaceutical Journal*, Londono, pĝ. 70:

Everything of value recording during recent years by British pharmacists has been incorporated in the monographs, and it is interesting to notice how freely the pages of our own only commentary on the British Pharmacopœia—'Pharmacopedia,' to wit—have been drawn upon for information. But this was only to be expected, since our brethren in Usona are nothing if not careful and judicious compilers. Much original work has doubtless been done by American pharmacists engaged in the production of the new national medicine-book, but the volume is, nevertheless, best described as an excellent compilation.

1907, *The Gateway*, pĝ. 25:

the natural impatience of a citizen of the United States at the idea of the word American referring to any one except himself and his fellow citizens choked off any chance of life the expression [Usona] might have had at that time.

A St. Louis professor endeavors to invent a new name for the United States, a cabalistic affair, USONA, composed of the initial letters of the words United States of North America

El la revuo *The Flaming Sword*, 1898.

1919, Charles Alphonso Smith, *New Words Self-defined*, pĝ. 198:

As a matter of fact, the name Usona [...] was first proposed by a Canadian, James P. Murray of Toronto, in 1885. (citita el letero en la ĵurnalo *New York Times*, 20 Julio, 1918)

Kaj jen la fina alineo el Wiktionary:

There was, however, the Usona Zinc Mining Co. of Kansas City in 1899, and a yacht out of Boston by that name in 1900. The Goodwin Pottery Co. produced a line called “Usona” from c. 1905 to c. 1912, and there were other brands, hotels, and companies of that name around the same time [Usona Mfg. Co (Aurora), Usona Films Co (Glendale), the Usona-Brazil Co (NY), etc.]. A small community founded in 1913 near Mariposa, California, is named Usona, from the same acronym. A US steamship named the Usona carried troops during World War I and sank in 1917. A famous hotel in Fulton, Kentucky,

was renamed the USONA in 1913, and kept that name at least into the 1930s. A company called Usona Bio-Chem Labs was in business in 1963, and a Usona Co. in 1974, but more recent use of the name may be a back-formation of the architectural term Usonian. Perhaps the greatest acceptance of the term, however, came from speakers of the international language

Esperanto, where “Usono” is the word for the United States. (All Esperanto nouns must by rule end in “o”, hence the change from “Usona” - an adjective form - to “Usono.”)

Dankon al Bob pro tiuj ĉi novaj klarigoj pri la uzado de la vorto *Usona* en la angla lingvo. Certe tio subtenas la vortojn kaj elektojn de Gaston MOCH.

senintenca esperantaĵo?

“triloka”

Breto SANDERS



Dankon al nia leganto Breto SANDERS pro la foto. Li skribis: “Mi supozas ke la kreintoj intencis diri, ke tiu ĉi parfumo plej efikas, kiam oni ĝin aplikas je tri lokoj sur la korpo, ekzemple, malantaŭ la oreloj, je la subaj partoj de la manradikoj, kaj (kiel mi ĵus eksciis, serĉante per Guglo) je la konkavaj kurboj de la kubutoj. Alternative, eble la parfumistoj deziris diri ke estas tri lokoj ĉirkaŭ la urbo kie konvenus porti paĉul-oleon – ekzemple, ĉe koncertoj de la *Grateful Dead*, ĉe vendejoj de medicina haŝiŝo, kaj (laŭ alia Guglo-serĉo) ĉe ritejoj de nov-paganoj.”

Usona Esperantisto

Sendu kontribuojn al <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ al:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn du monatojn post la eldondato, kun fontindiko. Bonvolu sendi ekzemplerojn de republikigita materialo al supra adreso. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktisto aŭ de Esperanto-USA.



Usona Esperantisto ("American Esperantist") is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content two months after publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to an address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.